

# KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ  
Jaro 39-a BRAZILIO, APRILIO-MAJO-JUNIO 2015 N-ro 158

“Amu vian Dion per via tuta koro  
kaj per via tuta animo kaj per via tuta  
menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”  
JESUO (*Mt*, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte  
rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”  
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.  
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante  
unu la alian, la popoloj faros en konsento  
unu grandan rondon familian.”  
ZAMENHOF. *La Espero*.

## POEMOJ EL LA PLI GRANDA MONDO

HO DIO, VENU VIA REGNO!

Eterna Kreanto, de l' mondoj nutranto,  
Sinjoro de l' Vivo, plej alta reganto,  
ni petas humile, se estas utile,  
permesu ke ĉie kaj ĉielsimile  
vastiĝu la kono de amo, pardono,  
aŭdiĝu la voko de Via admono,  
fariĝu la preĝoj de l' popoloj, reĝoj  
reflektoj de Viaj ordonoj kaj leĝoj!  
Ke ĉiuj komprenu la leĝojn, eltenu  
la provojn, kaj Via Regad' al ni venu!  
Ekreĝu surtere, interne, ekstere  
Fraterco kaj Amo, kaj reĝu prospere!  
Post nokto malhela eklumu la bela,  
afabla de l' suno vizaĝo fidela!  
Post tempoj amaraj, post nuboj malklaraj  
alvenu la regno de l' lumoj homaraj,  
fratec' de nacioj, la am' de ver-scioj,  
libero, tolero, la pac' de konscioj!

5/10/1943

*Antoni Grabowski [Spirito]*

LORENZ, Francisco Valdomiro. “Voĉoj de poetoj el  
la spirita mondo”. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma  
Federacio, 1987. 2. eldono. p. 34.

## REZOLUCIO DE LA INTERNACIA SPIRITISMA KONGRESO. PARIZO, 1925

LA INTERNACIA SPIRITISMA KONGRESO,  
KONSIDERANTE ke la estigo de Internacia  
Spiritisma Federacio postulas devigan utiligon  
de praktika rimedo por interkomunikado inter ties  
membroj, kiu ajn estu la nacia grupo al kiu tiuj  
apartenas;


KONSIDERANTE ke la simpla utiligo de naciaj  
lingvoj ne respondas al la necesoj, ĉefe de la  
koresponda servo liverata de la Sekretariejo de la  
Internacia Spiritisma Federacio;

REKOMENDAS insiste al ĉiuj Federacioj, Societoj  
kaj Spiritismaj Grupoj lernigi al ties membroj  
Esperanton kaj utiligi tiun helpan lingvon por koni  
kaj pli facile disvastigi la raportojn kaj komunikaĵojn  
de ĝenerala kaj internacia intereso de la Spiritisma  
Movado, kaj

INVITAS al la Plenuma Komitato de la Internacia  
Spiritisma Federacio interpreti ĉi tiun rekomendon  
en senco la plej pozitiva.

LÉON DENIS, honora prezidanto de la Internacia  
Spiritisma Kongreso. Parizo, 1925.

Fonto: “Reformador”, Aŭgusto 2000, p. 251-252.



# AMIKOJ DE LORENZ



La ĉi-numera **AMIKO DE LORENZ** estas la brazila samideano **ELMIR DOS SANTOS LIMA**, spiritisto, esperantisto, homeopato, pediatro, gvidanto de la Spiritisma Centro Fernandes Figueira kaj Bezerra de Menezes, instruisto de Esperanto ĉe Brazila Spiritisma Federacio, en Rio-de-Janeiro, aktiva kunlaboranto, amiko kaj konsilanto de nia Eldonejo.

**KORAN DANKON, KARA ELMIR!**

## NEGOCOJ

“Kaj li diris al ili: Kial vi serĉis min? Ĉu vi ne sciis, ke mi devas esti en la domo de mia Patro?” (\*) *Luko 2:49.*

La homo de l' mondo estas ĉiam okupita de negocoj rilataj al siaj pasemaj interesoj. Unuj trapasas la tutan vivon, observante la kurzojn de la borsoj, dum aliaj absorbiĝas en la studado de la merkatoj.

Tre maloftaj homoj sin dediĉas al siaj eternaj interesoj. La plejmulto ilin memoras tro malfrue, kiam ilia korpo ekmortas, kaj nur tiam ili vekiĝas el la fatala forgeso. La homa kreito devas tamen rigardi sian propran spiritan lumigon, kiel la plej bonan surteran negocon, ĉar tia operacio signifas la intereson de la Providenco pri ni.

Dio permesis la transakciojn sur la planedo, por ke ni lernu fratecon en la interŝanĝo, kaj Li lasis fariĝi la surterajn negocojn, ke per ili ni instruiĝu pri la plej granda el ĉiuj negocoj. Jen kial la Majstro klare parolas al ni laŭ la notoj de Luko: – “Ĉu vi ne sciis, ke mi devas esti en la domo de mia Patro?” (\*)

(\*) La portugala originalo tekstas: – “Ĉu vi ne sciis, ke mi devas zorgi pri la negocoj de mia Patro?” Simila demando stariĝis antaŭ la karmemora Prof. Ísmael Gomes Braga, kiam li tradukis “La Evangelion laŭ Spiritismo”, ĉapitro XXVIII, 3, VI. Fidele kopiinte la frazon el la esperanta traduko de la Nova Testamento, ni faras nenion alian, ol sekvi liajn spurojn, kaj kun li ni diras: “La eldono de la Biblio en Esperanto estas tre respektinda kaj la tradukinto ne kuraĝas ŝanĝi konscie ĝian tekston.” La Trad.

XAVIER, F. C. “**Caminho, Verdade e Vida**” (= “Vojo, Vero kaj Vivo”). Per la Spirito Emmanuel. Esperantigita de Affonso Soares. Eldono FEB. Ĉapitro 27. Publikita en “Reformador”, Aprilo de 1981, p. 108.

**KUNLABORU!** – Membriĝu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

**COLABORE!** – Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!

## LORENZ

### “KOMUNIKOJ”

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 39-a – n-ro 158 – Aprilo-Majo-Junio 2015

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj  
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

#### KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz  
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal  
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)  
Telefonoj: + 55-21-2452-9039 - + 55-21-2450-4768

Skaĵpo: Lorenz Editora | Fejsbuko: Editora Lorenz | Retadreso: [editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)  
Retpaĝo: <http://editoralorenz.blogspot.com.br>



Kompostita de Rogério Mota

# Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof

Respondoj al la amikoj (“La Esperantisto”, n-ro 3, p. 23)

Al s-ro N. en Vilno

La vorto “bezonesti” estas kunmetita tute regule, kaj Vi povas ĝin uzadi. Sed entute ni konsilas pli uzadi ĉiam formojn simplajn anstataŭ kunmetitaj. Kunmetado de vortoj estas karaktera eco de la lingvo germana, kaj al tiu ĉi lingvo ĝi efektive donas grandan riĉecon de formoj; sed en nia lingvo pleje estas pli naturaj kaj pli bonsonaj se ili estas ne kunligitaj, sed uzataj aparte.

Al Majnov, 1891

Estimata Amiko!

Mi forte miras, ke mi jam tiel longe ricevis de vi nenian leteron. Kio estas la kaŭzo? Mi ankaŭ miras ke mi ne trovas vin inter la abonantoj de “La Esperantisto”. Vi scias kredeble, ke en Nurnbergo estas nun eldonita via traduko de la “Renaskita Manfred”? Ĉu sinjoro Schmidt sendis al vi kelkajn ekzemplerojn? Estus bone se vi volus prezenti unu ekzempleron al la alta aŭtoro de tiu dramo.

Al Max Müller, 1891

Alte estimata Sinjoro Profesoro!

Mi sendas al Vi kolekton da libroj en la lingvo internacia “Esperanto”. Mi petas Vin humile, Sinjoro Profesoro, akcepti ilin kiel signo de mia profunda estimo al la glora maestro kaj la patro de la lingva scienco.

IOM Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof. Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895. Tokio: Eldonejo Ludovikito, 1989

## EL LA EVANGELIO LA DEVO

*Estu do perfektaj, kiel ankaŭ via ĉiela Patro estas perfekta. Mateo 5:48*



a devo estas morala ŝuldo de la homo, unue por si mem, poste por aliaj. La devo estas la leĝo de la vivo; ĝi troviĝas en la plej malgrandaj detaloj, same kiel en la plej altaj agoj. En la sfero de la sentoj, la devo estas tre malfacile plenumbla, ĉar ĝi kontraŭas la allogojn de l' intereso kaj de la koro; ĝiajn venkojn neniu atestas kaj ĝiajn fiaskojn la socio ne punas. La intima devo de la homo estas lasita al lia libera volo; la instigilo de la konscienco, tiu gardanto de l' interna honesteco, ĝin avertas kaj subtenas, sed ofte la konscienco estas senpova antaŭ la sofismoj de la pasio. Fidele observata, la devo de la koro altigas la homon.

La devo estas la praktika resumo de ĉiuj moralaj teorioj; ĝi estas braveco de l' animo, kiu alfrontas la angorojn de la batalo; ĝi estas severa kaj

fleksebla; preta kurbiĝi al la diversaj komplikajoj, ĝi restas nefleksebla antaŭ la tentoj. La devo estas la plej bela floro de la racio. La homo devas ami la devon, ne tial, ke ĝi antaŭgardas lin kontraŭ la malbonaĵoj de la vivo, kiujn la homaro ne povas eviti, sed tial, ke ĝi havigas al la animo la energion necesan por ties elvolviĝo. La devo grandiĝas kaj radias sub nova formo pli alta en ĉiu el la superaj stadioj de la homaro; neniam ĉesas la morala ŝuldo de la kreito al Dio; la homo devas speguli la virtojn de l' Eternulo, kiu ne akceptas simplan skizon, ĉar Li volas, ke la beleco de Lia verko brilegu antaŭ Li. (Lazaro. Parizo, 1863.)

KARDEC, Allan. **La Evangelio laŭ Spiritismo.** Tradukis Ismael Gomes Braga. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 2008. Ĉapitro XVII – Estu perfektaj – § 7.



# LORENZ 40-JARA



ulteno KOMUNIKOJ daŭrigas la publikigon de specialaj artikoloj omaĝe al 40-jara datreveno de SPIRITISMA ELDONA ASOCIO FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ, kiun oni festos en Decembro 2015. Ĉi-numere prezentiĝas la historio de la fondo de nia Asocio:

Pasadis la jaro 1975. La fratoj Néelson kaj Délio Pereira de Souza vizitis la samideanon kaj amikon Getúlio Soares de Araújo en la impona konstruaĵo, en kvartalo San-Kristoforo, kie sidas la Eldona Departamento de Brazila Spiritisma Federacio. Dum la interparolado s-ano Getúlio Soares de Araújo proponis la fondon de Esperanta libroklubo internacia por diskonigi Spiritismon en la tuta mondo. La vizitantoj tuj akceptis la ideon, kaj komencis la laboradon.

Unue ili invitis kunfratojn kaj samideanojn en nia lando. Aprobis la ideon kaj aliĝis al ĝi s-anoj Antônio de Pádua Soares (Teresina-PI), Benedicto Silva (Monte Aprazível-SP), Carlos de Almeida Wutke (Uberlândia-MG), Hermes de Deus Pitta (Salvador-BA), Jaddo Couto Maciel (Salvador-BA), João Severo (Bagé-RS), Joel Maciel Soares (Campos-RJ), José Pauluk (Londrina-PR), Walter Augusto Francini (São Paulo-SP), Tércio Palmerston Guimarães (Rio de Janeiro-RJ) kaj Nelson Afonso (Rio de Janeiro-RJ), kiuj, kune kun la tri samideanoj unue cititaj, subskribis la fandan protokolon.

Ili fondis la Societon en 15 de Decembro 1975, kaj laŭ propono de s-ano Néelson Pereira de Souza, ili donis la nomon de F. V. Lorenz, kiel omaĝo al tiu tre klera kaj laborema samideano. La kategorio "Fondinto" estis nefermita al novaj aliĝintoj ĝis Marto 1976, atendante respondon de la konsultitaj samideanoj. Ĝis tiam aliĝis aliaj dek sep samideanoj, ok brazilaj kaj naŭ eksterlandaj, el Hispanio, Ĉeĥoslovakio, Anglio, Aŭstrio, Kolombio, Hungario, Argentino kaj Usono.

La nova Societo promesis disdoni ĉiumonate spiritisman libron, kaj tiun promeson ĝi plenumis dum la unuaj jaroj, donacinte unu plian libron en decembro. Sed la titoloj ekelĉerpiĝadis, kaj la Societo devis malpliigi la disdonadon en la du sekvintaj jaroj: ses librojn kaj unu plian en decembro. Tiam ĝi mem komencis eldoni librojn pri Spiritismo.

## RENKONTO DE ESPERANTISTOJ EN LA PARAIBA-VALO

La 31-an de Majo 2015 okazis en la urbo Lorena, ŝtato San-Paŭlo, tradicia RENKONTO DE ESPERANTISTOJ EN LA PARAIBA-VALO. El tri brazilaj ŝtatoj kunsidis kvindek da samideanoj por praktiki la lingvon en amika etoso. La programo komenciĝis per prelego de Márcio Santos kaj Maira Nobre, pri la projekto "Esperanto en la Internacia Librofoiro de Rio de Janeiro".

Poste, prezentiĝis "Guto da Gramatiko" (Paulo Sérgio Viana). Sekve, montriĝis personaj ret-afiŝoj por faciligi lernadon de gramatikaj punktoj (Frederico Salmi). Senparola filmeto kondukis al diskutado por praktikado de la lingvo (José Roberto Tenório).

Fermis la renkonton diskuto kun la prezidantoj de ASOCIO ESPERANTISTA DE RIO DE JANEIRO (AERJ) kaj ESPERANTO-ASOCIO DE SAN-PAŪLO (EASP) pri la movado en tiuj ŝtatoj. La proksima renkonto en la Paraíba-Valo okazos en la monato Novembro, en la urbo Barra Mansa.



Sur la foto: Márcio Santos kaj José Roberto Tenório: AERJ kaj EASP kune. Foto: Paulo Sérgio Viana. Informas s-ano Paulo Sérgio Viana en la retpaĝo: <http://esperantoilustrita.blogspot.com.br/2015/06/renkonto-de-esperantistoj-en-la-paraiba.html>

# ESPERANTISTAJ POETOJ

*Sylla Chaves*

## NOMADEMO

Kial vi, malsaĝuleto,  
En la mondon ĵetas vin?  
Surde al la hejma peto,  
Ĉion lasas vi, poeto,  
Por tramondi sen destin'...

Kiu volo, kiu devo,  
Kiu celo movas vin?  
— Sekvi post fluganta revo,  
Tamen sen atingi ĝin.

*Sylla Chaves*

El la verko Esperanta Antologio: Poemoj 1887-1981, redaktita de William Auld kaj eldonita de Universala Esperanto-Asocio en 1984.

CHAVES, Sylla (1929-2009). Brazilano, prezidinto de Brazila Esperanto-Ligo (1978-1982), gajninto de la 1-a premio en poezia branĉo de Belartaj Konkursoj de UEA en 1962. Verkoj: Animo Prisma (1959), Por pli Bona Mondo (1970), Plurnacia Bukedo (1981), Karnavalo (1981). Li ankaŭ provizis la brazilan E-movadon per enviinda kompleto de modernaj instruiloj. En 1991 aperis lia Originala Esperanta Bildvortaro. Membro de la Akademio de Esperanto. Premio Onisaburo Deguchi en 1991.



## BEL-KONFERENCOJ 2015

En la 2-a kaj 3-a de Aprilo okazis la BEL-KONFERENCOJ, en la urbo Juiz de Fora, ŝtato Minas Gerais. Sub la aŭspicio de BRAZILA ESPERANTO-LIGO (BEL) kaj apogo de la loka Esperanto-klubo, ili konsistis el naŭ universitatnivelaĵoj prelegoj kaj diskutado kun la publiko, kiu vigle partoprenis per amaso da demandoj kaj komentoj post ĉiu konferenco.

Ne temas pri kongreso, sed pri kleriga serio da prezentoj fare de fakuloj pri la koncernaj temoj. La partopreno estis tute libera, senpaga kaj neformala. La temoj estis plej variaj: “Virinaj rajtoj” (Karina Oliveira), “Dufoje en Poznano” (Paulo Nascentes), “Kio estas simfoniorkestro” (Alfredo Aragón), “La perfekta lingvo laŭ Wittgenstein” (Ivan Colling), “Magnetismo” (Elmir Lima) kaj “Kiel kondukas hundoj” (Francisco Wechsler), inter aliaj. Oni planas la proksimajn “BEL-KONFERENCOJN” por la antaŭpaska semajno de 2016, en la urbo Curitiba. Elŝutu la resumojn de la prelegoj en la retejo de BEL: <http://esperanto.org.br/info/index.php/pages/bel-konferencoj>. Informas Paulo Sérgio Viana en la retpaĝo: <http://esperantoilustrita.blogspot.com.br/2015/04/vigle-renaskigas-la-bel-konferencoj.html>

## RENKONTOJ KUN DIFERENCULOJ

La gravega temo INTERKULTURA EDUKADO estas agrable kaj ĝisfunde pritraktata en ĉi tiu belega libro de nia kara amiko PRZEMYSŁAW GRZYBOWSKI, doktoro pri pedagogio, instruisto ĉe la Universitato Kazimierz Wielki en Bydgoszcz, Pollando. La verko havas mildajn kaj sentoplenajn ilustraĵojn de LUCYNA FIC, amatora, handikapita pentristino loĝanta en Barcin, Pollando. Temas pri kolekto de rakontoj pri diversaj personoj, kiuj pro variaj kialoj estas en sia medio diferencaj de la plimulto de la homoj. La rakontojn prezentas Kamila – kelkjara knabineto, kiu konscias, ke ĉiuj homoj estas egale gravaj kaj same bezonas estimon, amikecon kaj amon. En la retejo <http://www.edukado.net>, en la sekcio “klerigejo/liberaj studoj”, eblas trovi la tutan libron kaj partopreni retkurson pri ĝi. Kontaktigu kun la aŭtoro per: [diferenculoj@gmail.com](mailto:diferenculoj@gmail.com). Akiru ĉi tiun kaj aliajn librojn de la aŭtoro ĉe: <http://amazon.com/author/przemyslawgrzybowski>



# PROJEKTO “7 MINUTOJ KUN EMMANUEL” ESTAS LANĈITA DE “INSTITUTO SER”



Emmanuel, Spirito (Bildo)

“INSTITUTO SER” estas brazila spiritista institucio sindediĉanta al la disvastigo de la Evangelio je la lumo de Spiritismo. El la portugala lingvo, “SER” signifas “SÓCIO-ORGANIZAÇÃO DE ESPIRITUALIDADE E RELIGIOSIDADE” (= “SOCIA ORGANIZAĴO DE SPIRITECO KAJ RELIGIECO”). “SER” realigas plurajn projektojn, nome podkastojn, literaturajn-muzikajn seminariojn, studojn pri la Evangelio kaj la Malnova Testamento kaj la plej freŝan “7 Minutoj kun Emmanuel”, inter aliaj.

En 1948, la Spirito Emmanuel komencis seriaĵon pri komentario kaj studado de la Evangelio, diktante centojn da mesaĝoj al la mediano Francisco Cândido Xavier, unu el la plej elstaraj medianoj en la historio de Spiritismo. Kun la intenco prifesti kaj revivigi tiun majestan laboron, naskiĝis “7 Minutoj kun Emmanuel”. La psikografiaj tekstoj estas komentarioj de Haroldo Dutra Dias, brazila juĝisto, spiritista preleganto kaj tradukisto de la Nova Testamento. Ĉiuj sonregistroj estas senpage elŝuteblaj en la retejo de “SER”. Nun la projekto prezentiĝas en la angla, hispana kaj itala lingvoj, kaj ankaŭ en Esperanto. Eniru en la jena retpaĝo de “SER” kaj konu la projekton: <http://www.portalser.org/category/esperanto>

## ESPERANTA LIBROFOIRO

De la 18-a ĝis la 23-a de Aprilo, realiĝis la Tria Esperanta Librofoiro de la urbo Niterói. Tieaj gazetoj dum la tuta semajno publikigis raportojn pri tiu foiro. Tiun projekton aŭspiciis NITERÓI ESPERANTO-KLUBO (NITEK). Subtenas ĝin Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro, Eldonejo Lorenz kaj Spiritisma Instituto Bezerra de Menezes.

Laŭ la kunordiganto de tiu projekto, la atleto WALTER FONTES, kvankam la ĉiutaga deĵorado de la esperantistoj en la foiro estas laciga, la fina rezulto estas kontentiga. Unufoje pli la Esperanta movado de Niterói montris sian vigecon. NITEK kunigis fortojn por igi tiun lingvon konata de la publiko, kaj oni sukcesis, danke al la kunlaboro de ĉiuj esperantistaj institucioj de Rio.



Sur la foto: Aktorino Tania Paixão ludas la rolon “La Trampo”, kreitan de Charles Chaplin. Ŝi kvazaŭ altiris en la tendon pluraĝajn preterpasantojn, kiuj ne malmultajn fojojn faris fotojn kun ŝi. Informas Fabiano Henrique en la retpaĝo:



<http://esperantoilustrita.blogspot.com.br/2015/04/ec-pluvo-ne-haltigis-ilin.html>

## PUNA KODO DE LA ESTONTA VIVO

Kiaj ajn estas la malsupereco kaj maliceco de la Spiritoj, *Dio neniam ilin forlasas*. Ĉiuj homoj havas sian gardanĝelon (gvidanton), kiu zorgas pri ili, suflorante bonajn pensojn, vekante dezirojn progresi kaj ankaŭ esplorante la movojn de ilia animo, per kiuj ili klopodas ripari en ia nova ekzistado la malbonon, kiun ili praktikis. Sed tiu interveno de la gvidanto preskaŭ ĉiam fariĝas kaŝe, tiel ke ne okazu premo, ĉar la Spirito devas progresi per *impulso de sia propra volo*, neniam per ia altrudo. Bono kaj malbono estas praktikataj laŭ libera volo, kaj sekve la Spirito ne estas *fatale* pelita al unu aŭ alia direkto.

Kiam manifestiĝos la unuaj signoj de pento, tiam Dio faras lin duonvidi la esperon. Ne ekzistas Spirito nekapabla neniam progresi, destinita al eterna malsupereco, kio estus neado de la leĝo de progreso. Pento, kvankam ĝi estas la unua paŝo por regenerado, ne sufiĉas per si mem; *elaĉeto kaj riparado* estas necesaj. Pento, elaĉeto kaj riparado do estas la tri kondiĉoj necesaj por forviŝi la trajtojn de kulpo kaj ties sekvojn. Pento mildigas la amaraĵojn de la elaĉeto, malfermante per espero la vojon al renobligo; sed nur riparo povas nuligi efikon, detruante ties kaŭzon.

KARDEC, Allan. **La ĉielo kaj la infero**, aŭ la justeco de Dio laŭ Spiritismo. Esperantigis A. K. Afonso Costa kaj Benedicto Silva. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 1981. Parto unua. Ĉapitro VII – La estontaj punoj laŭ Spiritismo.